**Universala Esperanto-Asocio**

**KAPABLIGO EN FOKUSO**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2016-28 sendita el Budapeŝto, la 5an de oktobro, interalie okaze de la Internacia Tago de Instruistoj.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj.

# Jaro de la Lernanto – Filmkonkurso de ILEI

La konkurso nomiĝas 'Internacia Pedagogia Film-Festivalo de ILEI' kaj estis lanĉita – kune kun la jaro mem – en julio 2016. La celoj estas arigi filmetojn, kiuj levas la konscion de la publiko pri nia lingvo kaj kiuj stimulas junulojn pensi pri transdono de scioj per modernaj manieroj. La konkurso havas du kategoriojn: "lingvo" kun maksimuma daŭro de unu minuto kaj "interkultura harmonio" kun maksimuma daŭro de tri minutoj. La alkroĉita regularo donas ekzemplojn pri eblaj temoj kaj aliroj. Ĝi prezentas detalan konkursan kalendaron, aŭtoroj devos anonci sin dum januaro aŭ februaro 2017, kaj liveri la filmojn ĝis la 30a de aprilo 2017, kun anonco de la rezultoj en julio 2017 – la filmoj estos montritaj en la 50a Kongreso de ILEI en Busano, Koreio, kie la kongresanoj rajtos voĉdoni por decidi pri publika premio. Fine de la regularo aldoniĝas la Aliĝilo por partopreno.

Filmoj devas alveni en formato MPG-4 aŭ MP4 kun maksimuma pezo de 100 MB. Grandas la ebloj elekti ĝenron kaj uzotajn ekipaĵojn, sed la filmoj devas esti en Esperanto.  Por pliaj kondiĉoj, vidu la regularon. La ĵurio estas internacia kaj konsistas el aŭ profesiaj filmistoj aŭ personoj kun granda sperto en la kampo. Unua premio en ĉiu kategorio: €200, dua premio €100. La gajnantoj de la publikaj premioj ricevos diplomojn.

## Elstara kurso en Kvinpetalo




La kurso okazos en centra Francio en Bouresse inter la 24a kaj la 28a de oktobro.  Ĝi celas personojn, kiuj volas aliri lernejojn por enkonduki kursojn pri Esperanto. La kurson gvidos Katalin Kováts, redaktoro de <edukado.net> kaj sperta trejnisto de Esperanto-instruistoj. Ŝi gvidos 5-tagan seminarion celantan pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj.  Restas nur kelkaj lokoj. Ne maltrafu la okazon kaj rapide aliĝu!

Retadreso (por aliĝo kaj por praktikaj demandoj pri la restado): informoj<ĉe>kvinpetalo.org, Telefono : (+) 33 (0) 549 034 314. Por demandoj pri la enhavo de la staĝo, turnu vin al la gvidanto <katalin.kovats<ĉe>gmail.com.

## AMO inter sciencistoj, denove en Afriko

Ŝajnas, ke la sekva seminario pri Aktivula Maturigo okazos kadre de la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). La seminario pri AMO okazos ene de tiu aranĝo, kiu ekos vespere en la 17a de novembro (ĵaŭde) kaj finiĝos tagmeze en dimanĉo la 20an de novembro, kun eblo de posttagmeza ekskurso kaj plia tranoktado. La konferenco okazas en Modra Harmonia (30 km de Bratislavo – trajno ĝis Pezinok, poste loka buso) kaj 90 km de Vieno. Vidu detalajn informojn pri KAEST ĉe: http://kaest2016.ikso.net/

KAEST Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko

Alloga renkontiĝo, bonkvalitaj prezentaĵoj, densa programo, surlokaj loĝigo, manĝoj kaj bufedo, moderpreza, tre bona etoso, alloga ĉirkaŭaĵo (nelaste kun vinkeloj). La temo de KAEST kaj same tiu de la AMO-seminario: "Avantaĝoj kaj obstakloj de moderna komunikado". Ankoraŭ necertas la gvidontoj por AMO, sed aliratAj estas Chuck Smith, Stefan MacGill kaj du aŭ tri pliaj personoj.






Kredeble la sekva AMO-seminario okazos jarfine kadre de la 6a Afrika Kongreso de Esperanto en Bunda, Tanzanio, pri tiu kongreso ni jam abunde informis.

## Iniciato pri nova Esperanto-domo kun alvoko

La konata aktivulo Annie Grente skribas: "Mi aĉetis domon en Kreto (Neapoli), por ke ĝi estu 'Esperanto'-domo, mi ŝatus gastigi esperantistojn tie kaj ĉefe helpi, ke homoj (junuloj?) kiuj jam komencis lerni Esperanton povu vere uzi la lingvon kune. Do, mi ŝatus organizi semajnon (eble 13-20 Aprilo 2017, ĉar estas Pasko, kaj eble oni tiam pli facile ricevos libertempon...), dum kiu mi ŝatus gastigi 10 komencintojn (kun 10 malsamaj gepatraj lingvoj,

se eblas...). Mia propono estas, ke ili senpage dormu ĉi tie kaj pagu nur 5€ tage por manĝoj. Neapoli estas malgranda, malnova interesa urbo en bela regiono, 15 km for de la maro kun multaj ebloj promeni. En la domo mi povos organizi diversajn atelierojn (ekzemple franca kuirarto...).”

Kontakto: anniegrente@hotmail.fr

# Novaĵoj de la Novjorka Oficejo de UEA

Ĵus aperis komuniko “Esperanto por UN - Informilo de la UN-oficejo de Universala Esperanto-Asocio, numero 24, septembro 2016. Mallonga adreso: https://goo.gl/yXZWku

Jen la ligo al la esperanta versio che <http://www.linguistic-rights.org/eun/Esperanto_por_UN_Informilo_de_la_UN_oficejo_de_Universala_Esperanto_Asocio_Numero_24_septembro_2016.pdf>

***Enhavo:***

- Prezidanto Fettes: “Niaj kongresoj pruvas la potencon de lingvo neŭtrale homa por transponti la barojn, kiuj dividas nin.”
- UEA funebras la forpason de gvida pledanto por Esperanto, Nobel-premiito prof. R. Selten.
- Kongresanoj: “La strebado al lingva justeco estas aspekto de pli larĝa, plurkampa lukto cele al socia justeco kaj homaj rajtoj por ĉiuj”.
- Konferenco traktis lingvan komunikadon en la Eŭropa Unio.
- Forumo alvokis al interreligia agado.
- Aktiva somero: La UEA-oficejo ĉe UN kiel vera abelujo
- Interveno ĉe UN en Ĝenevo

La komuniko aperis angle kaj en Esperanto kaj eble en iuj pliaj lingvoj. La materialo povos esti konvena por gazetaraj komunikoj en aliaj lingvoj. Se vi tradukas materialon el la komuniko, bv. sendi tion ankaŭ al la liverinto de la komuniko, Stefano Keller.

Vortoj: 835

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

PDF farita de Nuance Power PDF